



Novjorka Prismo

Numero 151

Februaro 2006

La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia februara kunveno

Dato: Vendredon, la 17-an de februaro 2006, 6:30-9:00 pm

Loko: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

Programo: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Tomaso Eccardt parolos pri “mikropatrologio,” kaj specife, la problemoj kaj avantaĝoj, kiujn havas komune la sep plej malgrandaj landoj de Eŭropo. Li vendos sian libron pri tiu temo je la plej malalta kosto kaj subskribos ekzemplerojn.

Scott Page parolos iomete pri Moresnet, malgranda lando, kiu ne plu ekzistas sed intencis paroli Esperanton oficiale. ★



Protokolo de la kunveno de la 20-a de januaro 2006

Stuart GREEN oficiale malfermis la januan kunvenon je la 7-a horo kaj duono. Li bonvenigis ĉiujn al la unua formala kunveno de 2006. Entute ĉeestis 9 personoj.

La protokolo de la decembra kunveno estis akceptata. Ankaŭ la antaŭa protokolo, de la novembra kunveno, estis akceptata malfrue.

Stuart parolis pri libro de svedo Leif NORDENSTORM, verkisto kaj luterana pastro, kiu ĵus vizitis Novjorkon. La titolo de la libro estas *Arne, la ĉefido*.

Ĝi estas porinfana libro en Esperanto pri vikinga knabo. Oni vidas la antikvan vikingan kulturon tra la okuloj de la knabo. La libro estas tre bele ilustrita. Nijl BLONSTEIN menciis, ke



s-ro NORDENSTORM estis redaktoro de la revuo *Kontakto* kaj verkis bibliografion pri esperantlingvaj religiaj libroj.

Tomaso ECCARDT anoncis, ke li ankoraŭ ne komencis sian novan kurson. Li proponis, ke eble li komencos kurson por infanoj se estos intereso. Li invitas personojn telefoni al li, se ili konas infanojn, kiuj volas lerni Esperanton.

Poste, Nijl prelegis pri Brazila socio, kaj pri la

unika karaktero de la Esperantomovado en Brazilo.

Stuart oficiale fermis la kunvenon je la 9-a horo pm. ★

Protokolis: Jeff BLAKESLEE

IBM Plaza

La 5-an de februaro 13 novjorkaj geesperantistoj kaj israela gastoj, Jehezkel Malkin, kunvenis ĉe IBM Plaza. Oni parolis pri la Jarkongreso de ELNA inter aliaj aferoj. Nia gastoj disdonis ekzemplerojn de sia landa revuo. ★



– Tom ECCARDT



Historio de la Esperanta movado en Novjorko – dua parto

En tiu ĉi parto de mia serio de artikoloj pri la historio de Esperanto en la novjorka regiono, mi diskutas la biografiojn de kelkaj el niaj plej elstaraj geesperantistoj de la frua movado. Mi ĉi foje ellasos kelkajn partoprenantojn de la tri skismoj, ĉar ili verŝajne aperos en artiklo pri tiuj katastrofoj en la Novjorka movado.

Dum la frua periodo, ŝajnas, ke estis pluraj esperantistaj inĝenieroj kaj aliaj eminentaj spertuloj en ties fakoj. Rufus W. Powell estis ekzemplo. Li naskiĝis en 1845, verŝajne en Bruklino. Li estis spertulo pri gluo, kaj verkis libron "Glue statistics" en 1893 pri la statistikoj kaj historio de glufarado en Usono. Ŝajnas, ke li interesiĝis pri Esperanto sufiĉe antaŭ la jaro 1914, kiam li aperas en la revuo "Amerika Esperantisto," kiel la instruisto de unu el ses Esperanto-kursoj okazantaj en Novjorko. Post tio, li aperis plurfoje, ekzemple, kiel fondinto de la Komitato por Komerca Komuna Lingvo al kiu li kaj Henry W. Fisher, kaj James F. Morton, Jr. kontribuis \$388.50. Ŝajnas, ke tiuj ĉi tri homoj estis finance sukcesaj. En Januaro 1919, estis anoncite, ke Rufus parolis pri "Japan Salesman" dum klubkunveno. Li interesiĝis pri Azio kaj eble vizitis. Rufus kaj lia edzino ankaŭ estis Bahaiistoj, kaj ili instruis Esperanton al la fama misiistino Agnes Alexander en 1913, ĵus antaŭ ol ŝi marveturis al Japanio. Rufus ankaŭ verkis artikolon nomita "The Internal Idea of Esperanto" en la revuo "Reality." En ĝi, li diris, ke Esperanto "estas la plej bona lingvo jam trovita per kio la saĝeco kaj spiritalaj aspiroj de la Oriento povas esti komunikataj al la Okcidento, kaj ankaŭ per kio la necertaj penoj de la Okcidento povas esti uzataj por vekti la dormeman Orienton." Tiu artikolo kaj lia libro estas videblaj en la novjorka publika biblioteko.

Henry F. Fisher, naskita en Irlando en 1861, emigris kun siaj gepatroj en Usonon kaj eventuale fariĝis elektra inĝeniero. Li komencis sian karieron en Pitsburgo, Pensilvanio, ĉe Standard Underground Cable Co. En 1907 li lernis Esperanton, kaj vigligis la movadon en Pitsburgo. En 1911 lia kompanio sendis lin al Perth Amboy, Novjerkio, kio vere estis donaco al la novjorka movado. Li tiom sukcesigis tiun branĉon de la kabla kompanio, ke li gajnis la respekton de la tuta komunumo de Perth Amboy, inkluzive de kelkaj lokaj ĵurnaloj, kiel "Perth Amboy Evening News." Ne estas troigo diri, ke Perth Amboy fariĝis Esperanto centro, kaj ke ĝiaj ĵurnaloj fariĝis buŝaĵoj de Esperanto. Inter pluraj aliaj similaj aferoj, oni raportis en "Amerika Esperantisto" de novembro, 1914, ke J. Logan Clevenger, ed., skribas en "Perth Amboy Evening News," ke post la milito, estiĝos "Uniĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo" kaj sugestas Esperanton por ties oficiala lingvo. En 1916, oni raportas pri la kreado de Bruklina Esperanto Socio de kio HW Fisher estis unu el tri vic-prezidantoj. Kaj en majo de 1925 li kaj lia edzino okazigis beneficnan vesperrangon ĉe Cornell Club por la Internacia Auxiliara Lingva Asocio, kies honora gastino estis Mrs.



Dave H. Morris (de la riĉa familio Vanderbuilt). Ankaŭ en sia profesia kampo, Sro Fisher elstaris. Li estis membro de la Internacia Electro-Teknika komisiono kaj membro de la normiga komitato de AIEE, kies celo estis la unuigo de elektrikaj terminoj en pluraj lingvoj. Oni scias malmulte pri la Tuvalia Amikaro, inkluzive la signifon de "Tuvalia," sed ŝajnas, ke ĝi estis sektreta societo en kiu partoprenis Henry Fisher. Alia tiutempa eminenta Esperantisto, Edwin C. Reed, estis membro, kune kun la fama homrajta avokato kaj psikologo Theodeore Schroeder. Dum sia vivo, Henry servis kiel prezidanto de la usona landa organizo, EANA, kaj li mortis en 1937. Oni enterigis lin en kvakera tombejo.

La edzino de Henry Fisher certe helpis kun liaj agadoj, kaj la edzino de Rufus Powell estis aktiva esperantistino kaj instruis. Sinjorino Powell persone adiaŭis la Bahaian Esperantistan misiistino Agnes Alexander je la komenco de ŝia vojaĝo al Japanio, donante al ŝi Esperanto-libron kun brodita verda stelo. En tiu tempo, multaj virinoj ricevis malmulte da laŭdadoj, kvankam ili laboris tiel fervore kiel siaj edzoj. Mrs. Dave H. Morris estis ekzemplo de virino kiu uzis nenian parton de sia fama nomo Alice Vanderbuilt, favore al tiu de sia edzo. Multaj edzinoj de esperantistoj sendube multe laboris por la movado.

Sed en la fruaj jaroj de la usona Esperanta movado, estis tri fraŭlinoj kies nomoj konstante aperas en novjorkaj novaĵoj: Cora L. Butler (poste Cora L. Fellows), Leonora Stoeppler, kaj Della Lincoln (poste Mrs. Patrick Quinlan). Fraŭlino Butler instruis plurajn kursojn, inkluzive en Washington Irving High School kaj Bruklina Publika Biblioteko. Ŝi prezentis prelegon ĉe unu el la unuaj memorigaj servoj je Zamenhofa tago. Kaj en 1916 ŝi estis prezidantino de la novjorka societo. Ŝi scipovis ludi pianon, profesie donis lecionojn, kaj tradukis kantojn al Esperanto. Ŝi estis aktiva en la movado dum pli ol 40 jaroj.

En la 1920aj jaroj Della Lincoln instruis klasojn en sia domo. Ŝi estis Bahaiistino, kaj sendis leteron al Agnes Alexander en 1923 kiam tertremo trafis Tokion. En 1930 ŝi estis sekretario kaj kassistino de la sepa ĉapitro de EANA (Essex county, Novjerkio), kaj en 1933 ŝi kunfondis novan bruklinan klubon.

Leonora Stoeppler estis aktiva instruistino en Novjorko kaj internacia vojaĝanto. En la 1910aj jaroj ŝi estis sekretario de la "Greater New York Esperanto Society." En 1923, ŝi instruis 18 homojn en la lernejo "Miss Chapin's School, 32 East 57th Street." Ŝi fariĝis grafikajnoj por la instruado de la klaso. En la sama jaro, ŝi ĉeestis la 15an UK en Nuremburgo. Dum la kongreso, usona prezidento Harding mortis, kaj la urbestro de Nuremburgo esprimis al Fraŭlino Stoeppler siajn kondolencojn kaj admiradon por Harding. Leonora parolis kun li germane, kaj oni tradukis la konversacion al Esperanto por la ĉeestantoj, inkluzive s-rinon Zamenhof. Priskribo estis sendita kable al Usono, kaj la tuta afero aperis en kaj germanaj kaj usonaj ĵurnaloj.

D.A. Klaĝin (foje "Klajin") estis Serbo kiu partoprenis en la novjorka Esperanto movado ekde ties komenco. Li ankaŭ estis aktiva en la laborista movado. Li instruis plurajn kursojn, inkluzive por iu "libereco" grupo. Sed la plej granda agado

Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Februaro 2006

17

ESNY KUNVENO

Tomaso Eccardt parolos pri
sep malgrandaj landoj

Vendredon, 6:30 pm ĉe UFT

Marto

5

Tagmanĝo

Dimanĉon, 1:00 pm ĉe IBM Plaza

(Limdato por kontribuajtoj por Prismo 152)

17

ESNY KUNVENO

Vendredon, 6:30 pm ĉe UFT

United Federation of Teachers (UFT)

50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

"IBM" Building Atrium

590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

de D.A. Klaĝin estis la klubo "Harmonio." Harmonio tiel nomiĝis pro ĝia muzika celo. La klubo de D.A. Klaĝin allogis multege da partoprenantoj - pli ol cent, ĉe liaj "barĉoj" en la Hotel Endicott - eble pro la fakto, ke por kanti en Esperanto, oni ne nepre devas lerni Esperanton. En majo 1922, lia klubo gastigis Tereseta Gascon-Ferrer, 6-jara alĝeriano, kiu deklamis lian poemon "La Printempo." Tiu knabino ekfamigis en la tiama movado. En la malfruaj 1920aj jaroj, D.A. Klaĝin prezentis semajnajn prelegojn pri Esperanto per radio. Li eĉ mortis dum Harmonia klubkunveno en Februaro de 1929 ĉe Bahaia centro. NY Times artikolo ("Drops Dead While Dancing") diris, ke li mortis dum li dancis, sed Amerika Esperantisto diris, ke li mortis dum aktorado en malgranda teatraĵo. Ĉu estis eble muzika teatraĵo?

Joseph Silbbernik estis la bofrato de L.L. Zamenhof, brava defendanto de ties lingvo, kaj honora membro de novjorkaj kluboj. Kompreneble, li bonvenigis sian fratinton Klara kaj ŝian edzon Ludoviko al Vaŝingtono por la UK de 1910. Li skribis plurajn leterojn al NY Times pri la utileco de Esperanto kaj respondis al la atakoj de ties malestimigantoj. Li estis ĉefdelegito de UEA en Novjorko. Li malfermis sian domon ĉe Orienta 18a Strato ĉiun dimanĉon dum jaroj por dimanĉa kunveno je la 3:00. Li instruis plurajn kursojn, kaj ŝajnas, ke li estis iom postulema pri la parolmaniero de la novjorka esperantistaro, libere plibonigante ilian gramatikon. Li iris al Ĝenevo (17-a UK) por viziti nevinon, kontraŭ la ordonoj de siaj kuracistoj, kaj mortis 3 tagojn post sia reveno al Novjorko je la 30-a de aŭgusto 1925. ★

— Tomaso ECCARDT

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Stuart Green
(631) 751-5683

Korespondanta Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Jeff Blakeslee
(718) 383-2715

Vicprezidanto
Nijl Blonstein

Kasistino
Sofiya Soskina
(914) 738-6084

Program-Direktoro
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Novjorka Prismo

Numero 151 – Februaro 2006
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2006 Esperanto Society of New York